

Aŭtoro de Esperanto
D-ro L. L. Zamenhof
(1859 – 1917)
*Gravuraĵo de Reto Rossetti*

Dumonata Bulteno
de la
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

# NORDA GAZETO

Informilo n-roj 1 kaj 2/271 (38a jaro)
Januaro-Februaro Marto-Aprilo 1978

Redaktoro kaj
responda eldonanto:
Lucien BOURGOIS
25 rue Gambetta
62950 NOYELLES-GODAULT
(Tel. (21) 20.23.32)

Ricevas ĉiuj aktivaj UFE-membroj en la Federacia teritorio kaj la pagintoj de jenaj kotizoj:

20 F : Aktivaj Membroj
15 F : Membro-abonantoj
10 F : Junuloj au Pensiuloj

pagendaj al:
Fédération Espérantiste
du Nord de la France
25 rue Gambetta
62950 NOYELLES-GODAULT

per poŝta ĝiro LILLE 517-15 aŭ banka ĉeko en *la nomo de la Federacio* sendota rekte al la kasisto:
Fernand DITACROUTE
Rond-Point Jean Jaurès
24430 RAZAC SUR L'ISLE.

Mondonacoj por la PROPAGANDO-FONDUSO estas dankeme akceptataj.

sekretariato:
M. VILHELM de JONG
16 rue des Aubépines
59155
FACHES-THUMESNIL

## KONGRESO de Nordfranca Esperanto-Federacio

*6-a kaj 7-a de Majo 1978*

*ATENTU! ATENTU!*

La Federacia Kongreso okazos NE kiel antaŭe anoncite, ĉe Centre des Dominicains, sed en salono afable disponigita de la urbo, en la centro de LILLE, apud la urbodomo: Pavilono St Sauveur.

Temas pri historia konstruaĵo, nome: la pavilono de la iama hospitalo St Sauveur.

Estimataj Gesamideanoj,
Ni invitas vin honori per via ĉeesto nian jaran kongreson. Konsentis eniri la honorkomitaton oficialuloj, nome: Pierre MAUROY, Urbestro de LILLE kaj Prezidanto de la Regiona Konsilio, kaj Albert DENVERS, Prezidanto de la Nord-departementa Konsilio, cetere subskribintoj de la leĝpropono por enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lingvo en la duagradan instruadon.

Ni substrekas la allogan programon aranĝitan de la L.K.K.-anoj kaj estas certaj, ke vi rekompencos ilin per via multnombra partopreno!

Ni antaŭdankas kaj rendevuas ĝis la 6-a kaj 7-a de Majo en LILLE!

La Federacia Estraro

*SURVOJE AL LA KONGRESEJO...*

De la stacidomo de Lille vi atingos la kongresejon post promenado malpli ol dekminuta, tra ĵus konstruita parto de kvartalo St Sauveur. Ĉirkaŭ vi turas modernaj konstruaĵoj, dekstre ĉefe loĝaj, maldekstre administraj kaj komercaj. Vi vidos novan sportejon maldekstre, kaj sur muro de apuda lernejo grandan koloran dekoracion de PIGNON.

Jam de fore vidiĝas la urbdomo kaj kiam vi preterpasis preĝejon St Sauveur vi trovos nian kongresejon, la Pavilonon St Sauveur, kiu staras modeste je kelkdekoj da metroj fore de la strato inter du modernaj lernejoj, kvazaŭ perdita perlo el antaŭaj jarcentoj. La ĉarma konstruaĵo de la 17-a jarcento, el ŝtono kaj briko, estas

restaĵo de iama hospitalo.

En tiu sama kvartalo vi povos admiri aliajn historiajn monumentojn: 'la nobela turo', la skvaro 'du Réduit' 'kun ĉarma ĝardeno, 'la Pariza Pordego' kaj 'la Genta Hospico'. Kaj eble vi suriros dimanĉe matene la urbodoman turegon 'La Belfrido' (pli ol cent metrojn alta).

*Por la membroj de UFE. VOĈDONADO*

La voĉdonado rilate al la agad- kaj financa raportoj de UFE kaj renovigo de la Konsilio okazas dum la Federacia Kongreso. Tiucele la sekretariino listigos la membrojn, kiuj rajtas voĉdoni.

Vi povas ankaŭ voĉdoni perkoresponde, sendante vian voĉdonilon al la federacia sekretariino antaŭ la 5a de Majo.

Por ke via voĉdonilo estu valida, ĝi kunportu NEK aldonojn, NEK subskribon! Metu vian voĉdonilon en koverton – *sen iu ajn ekstera signo* – kaj enŝovu tiun koverton en alian, adresitan al la federacia sekretariino, skribante sur la dorsa flanko viajn nomon, adreson kaj subskribon.

*La Federacia Kongreso en historia konstruaĵo: La Pavilono de la iama hospitalo St Sauveur!*

*KATALUNOJ KAJ VASKOJ*
*– ekzemploj de nordaj kaj sudaj minoritatoj*

Kontraŭe al la novaj lingvo-minoritatoj de gast-laboristoj, la malnovaj, indiĝenaj 'grupoj' (kiuj nombras kelkcentojn aŭ eĉ kelkajn milionojn) vivas kutime en la periferio de la ŝtata teritorio – kimroj, gaeloj, manksanoj kaj komvalanoj en Grandbritio, – slovenoj, kroatoj kaj madjaroj en Aŭstrio, – svedoj kaj sameoj en Suomio, – grekoj, albanoj, germanoj, slovenoj, okcitanoj kaj katalunoj en Italio, –frisoj kaj danoj en Federacia Respubliko-Germanio.

La ekonomiaj konsekvencoj estas sufiĉe diferencaj, kaj ili vole-nevole kondiĉas la kulturan (ne-)evoluon.

La prelego prezentos konkretajn faktojn el 'ambaŭ Vaskioj kaj Katalunoj'.

Uwe Joachim MORITZ

---

*NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS*

Konata de Nordfrancoj, aparte de la membroj de la E-grupo de Valenciennes, kie ŝi iam prelegis pri Hinda Unio, forpasis S-ino Madeleine HAUDEBINE, 77-jara Ĉe-metoda instruistino.

## NIA VIVO

*PRELEGOJ*

HENIN-BEAUMONT : Kadre de la ekspozicio de I. FLACZYNSKI 'Popoloj kaj legado', S-ro MASSON prelegis kun diapozitivoj pri E° ĉe la Junulardomo en Hénin-Beaumont 20-an de januaro. Artikolo anoncis tiun interesan vesperon en *Nord-Matin* sub titolo: 'l'Espéranto, une révolution culturelle'. Ĉeestis ĉ. 30.

LILLE : Skota esperantisto, D-ro Albert GOODHEIR, prelegvojaĝis tra Francujo. La 14-an de februaro, li prelegis en Lille kaj prezentis belegajn diapozitivojn. Bedaŭrinde ĉeestis nur 19 personoj.

Fine de januaro, dum la ĝenerala kunsido de Lille-Esperanto, gazetraportisto fotis la ĉeestantojn. Poste Renée TRIOLLE prelegis pri Islando. J. P. VILHELM raportis por la gazetaro. *La Voix du Nord* publikigis tiun artikolon sub titolo: 'Ils ne veulent pas tenir leur langue mais la faire connaître à tous'.

En *Nord-Matin*, ĝi aperis kun foto sub la titolo 'Un congrès national d'espéranto aura-t-il lieu à Lille en 1979?'

Lille-Esperanto kunvenos la 23-an de aprilo, la 28-an de majo kaj la 25-an de junio, je la 15-a 30 en Foyer Louise de Bettignies, 6 rue A. Leleux, Lille. Inf. Tel. (20) 973927.

ROUBAIX-TOURCOING : kunvenos la 16-an de aprilo je la 15-a ĉe: Ges-roj LEGROS, 37 rue Guillaume TELL, en Lille. Ĉe la programo: 'Majaj renkontiĝoj kaj kelkaj kutimdiroj' (BOURGOIS). Kluba estraro: M. VILHELM (prez.), R. TRIOLLE kaj M. GILOTEAUX (sekr.), M. DELCOURT (kasisto).

Lastan jaron, la gazet-servo de *Nord-Esperanto* aperigis sume 46 artikolojn (el kiuj 9 pli ol 50-liniaj) ĉefe en la ĵurnaloj *Nord-Eclair, Nord-Matin, La Voix du Nord* kaj en la revuo *Elan.* La unuaj artikoloj en 1978 temis pri novaĵoj el Irano kaj el 7 aliaj landoj. Krome, aktivuloj publikigis informojn kaj artikolojn en siaj regionaj ĵurnaloj, ekz. en Lille, Valenciennes, Amiens, ktp.

Unuafoje, la urbestraro de Roubaix akceptis dum festa kunveno la reprezentantojn de ĉiuj lokaj asocioj. Pluraj esperantistoj ĉeestis nome de la Esperanto-klubo kaj de la Pacodomo.

Komence de la jaro, en liceo Baudelaire, Roubaix, 28 gelernantoj de abiturienta klaso detale informiĝis pri E° dum la stud-horoj.

## LA FONDATION ANNE et ALBERT PROUVOST

Située en pleine nature au coeur de la Métropole Nord, la Fondation Anne et Albert Prouvost se présente comme un ensemble de bâtiments rustiques aménagés. Chacun d'entre eux réserve au visiteur une surprise et l'on peut aller du magasin de l'artisanat au restaurant puis à la brocante ou passer à la galerie d'art, au magasin de minéraux ou encore au pavillon CRG qui représente des photographies.

Ces activités annexes, par les loyers qu'elles fournissent, contribuent au fonctionnement de la Fondation dont le but est de faciliter à tous l'accès de la culture et de répandre le goût des arts.

C'est ainsi que depuis octobre 1975 la Fondation organise des expositions temporaires quelquefois prolongées par des conférences, des concerts ou des animations pour enfants.

Au printemps 1978 Pierre Bonnard est à l'honneur. L'exposition rassemble une cinquantaine de toiles provenant aussi bien de musées que de collections particulières ainsi qu'un certain nombre de dessins.

L'exposition comprend des oeuvres de jeunesse comme des vues de Virieu en Dauphiné, une scène de rue ou encore l'après-midi bourgeoise qui montre de façon assez amusante la famille de l'artiste rassemblée; puis aussi des oeuvres de maturité, quelques très beaux nus, des natures-mortes et des paysages du midi de la France.

Ce peintre de la beauté du monde charme d'emblée ceux qui le découvrent, tandis que les familiers de son oeuvre ne se lassent pas de l'admirer.

Mlle M. Mattias
10-2-78 conservateur de la Fondation

## LA FONDAĴO ANNE kaj ALBERT PROUVOST

Meze de naturo kaj kore de l' Norda Metropolo, la Fondaĵo Anne kaj Albert Prouvost aperas kiel aro de aranĝitaj kampodomoj. Ĉiu el ili iel surprizas la vizitanton, kaj oni povas promeni de la manlaboraĵejo ĝis la restoracio aŭ la brokantejo aŭ manĝeti en la farmejo aŭ krome paŝi al la artgalerio, la mineralmagazeno aŭ ankoraŭ al la pavilono CRG, kie estas montrataj fotoj.

Tiuj kromaj aktivaĵoj, pro la havigataj lupagoj, kontribuas la bonfunkciadon de l'Fondaĵo, kies celo estas faciligi al ĉiuj la aliron al kulturo kaj disŝatigi la artojn.

Tiel ekde oktobro 1975 la Fondaĵo organizas momentajn ekspoziciojn, foje sekvatajn de prelegoj, filmprojekcioj, koncertoj aŭ porinfanaj animadoj.

Printempe de 1978 honoriĝos Pierre Bonnard (elp. Bonard). La ekspozicio kuniĝos ĉirkaŭ kvindek tolpentraĵojn venontajn kiel el muzeoj, tiel el privataj kolektoj, kune kun kelke da desegnaĵoj.

En la ekspozicio videblos junaĝaj verkoj, kiel vidaĵoj de Virieu en Daŭfenejo stratsceno aŭ burĝa posttagmezo, kiu montras en sufiĉe amuza maniero la kunigitan familion de l'artisto; ankaŭ videblos maturaĝaj verkoj, kelkaj tre belaj nudaĵoj, senmovaĵoj kaj sudfrancaj pejzaĝoj.

Tiu ĉi pentristo de l'mondobelo senpere ĉarmas la malkovrantojn lin, dum la konantoj de lia verko neniam laciĝas ĝin admiri.

tradukis Vilem

---

La Pacodomo festis la unuan datrevenon de sia fondiĝo. Salutis la gastojn P. BOURDON, prezidanto de la Domo kaj de 'Lille-Esperanto'.

'Kia energio? Por kia mondo?' Jen la temo pritraktota la 13-an kaj 14-an de majo dum la Internacia Kongreso de la Mondcivitanoj en la Pacodomo. Inf.: S-ro L. BOURDON, Pacodomo, 50 rue Dammartin, 59100 ROUBAIX.

### 60-a Kongreso de Belga Esperanto-Federacio
### 29-a de aprilo ĝis 1-a de majo 1978

Tiu grava Esperanto-manifestado okazos samtempe kiel nia Markola Kongreso. Interesatoj, kiuj ne deziras ĉeesti en Folkestone, sed preferas kongresi en Charleroi, sin turnu al : F-ino A. ORSOLINI, 6 rue P. Pastur, B 6000 CHARLEROI (Belgio).

## PRI NIAJ GEAMIKOJ

E. PLUTNIAK estas nun instruisto kaj urbestra sekretario en Havincourt. Li skribis jenon : Miaj gelernantoj korespondas kun lernejo el Pollando – ili skribas france, mi tradukas E-en : tiel ili iom post iom studas la internacian lingvon'. Jen nerekta, tamen espereble fruktodona metodo.

Aperis nova franclingva verko de G.H. BAUDRY (Lille) pri TEILHARD DE CHARDIN kaj E. MOUNIER.

Iniciate de Chantal kaj Daniel KMIECIK, resp. filino kaj bofilo de J. DIETRICH, aperis 2½-paĝa artikolo pri E° en *Destinées Fraternelles*, n-ro 3 (1977), kvaronjara organo de 'Klubo de la Amikoj de Nacia Astrologio kaj Humanaj Sciencoj de la Rochelle'.

Konata de la nordfrancaj radioaŭskultantoj, D-ro Antonio DE SALVO, redaktoro de la E-programo de Radio Roma, iĝis redaktoro de '*Espero Katolika*', oficiala organo de IKUE, kaj de '*L'espéranto*', organo de l'Itala Esperanto-Federacio.

Janine VINCENT iĝis Prezidantino de la Centrokcidenta Esperanto-Federacio.

Grégoire MAERTENS (Bruĝo) estis nomita Kabinet-Ataŝeo en la ministerio pri financoj en Bruselo. Koran gratulon!

## STUDSEMAJNO POR INSTRUANTOJ

*Ĝi okazos en Boulogne sur Mer, la 10-an kaj 11-an de junio. Estas antaŭviditaj ekspozicio pri lernmaterialoj, prelegoj, diskutoj pri instruado de Esperanto (kiel malfermi kurson, kion instrui, per kiaj metodoj, kiel kunigi lernantojn al organizita movado, kiel kunlabori kun aliaj kulturaj asocioj, ktp.).*

Aliĝkosto : 10 FF. Restadkosto (tranoktado kaj 3 manĝoj en junulargastejo) 50 FF.

Inf.: R. TRIOLLE, 2 Bd de Douai, 59100 ROUBAIX.

## PARLAMENTA GRUPO EN ROMO

La 18-an de januaro ce la Salono de la Senata Komisiono pri Agrikulturo en Romo, okazis la fondiga kunveno de la Parlamenta Grupo 'Amikoj de Esperanto' kies estraro konsistas el kvar senatanoj kaj tri deputitoj.

## PRI LA NACIA KONGRESO DE U.F.E.

Ĝi okazos en Clermont-Ferrand ĉe Pentekosto. Kvar laborgrupoj pritraktos la ĉeftemon 'LA VIVO EN LA LOKA KLUBO'. (A) La partopreno de la kluboj en la Esperanto-Semajno; (B) La reklamo pri la internacia lingvo; (C) Kursoj kaj kunvenoj, ĉu ili sufiĉas por konservi la homojn? (D) La reklamo per la homaj kontaktoj, konversacioj, vizitoj, enketoj, rendevuoj; la ĉiutaga reklamo.

## GAGNEZ UN LIVRE (3)

*LA GRAND MOMENT EST ARRIVE!*

Si vous notez maintenant quels articles vous avez beaucoup aimés (ou peu, ou pas du tout, au à la folie) dans les 3 derniers numéros de *Norda Gazeto*, et si vous m'envoyer des réflexions avant le 1er mai, vous participerez au tirage au sort pendant notre congrès fédéral et vous pourrez gagner 'Ĉu vi kuiras ĉine?'.

Si vous avez très peu de temps, donnez des notes aux divers articles et rubriques : ça tiendra sur une carte postale!

Je demande à tous, débutants ou espérantistes chevronnés, de participer à cette petite enquête sur notre bulletin. Je ferai le compte-rendu pendant le congrès. M. VILHELM

## *ESPERANTO EN ALTLERNEJOJ*

*Irano :* La Ministro pri Scienco kaj Altlerneja Edukado rekomendas la instruon de Esperanto al profesoroj pri literaturo kaj fremdaj lingvoj.
*Brazilo:* En la Fakultato de Sao Paulo 175 studentoj lernas esperanton. Instr: Prof. E. FONTES.
*Ekvadoro:* D-ro ZURITA instruas E-on ĉe la Centra Universitato de Quito.
*Usono:* La E-kurso sukcese disvolviĝis ĉe la Universitato de E. Colorado.
*Belgio:* En la Universitato de Bruselo malfermiĝis E-kurso.

## *SUKCESOJ EN ORIENTA FRANCIO*

S-ro Yves GUEGUENIAT, agregacia profesoro pri beletro kreis 4 E-kursojn en Selestat kun sume 140 gelernantoj.

Funkcias aliaj kursoj en Münster (20 gelernantoj), Metz (33), Wirkersheim (15) kaj Bar le Duc (50).

# 14-a MARKOLA KONGRESO

## FOLKESTONE (Kent) – Anglio
de la 28-a de Aprilo ĝis la 1-a de Majo 1978

Estimataj gesamideanoj,
Por tiuj, kiuj jam partoprenis la antaŭajn trilandajn renkontiĝojn, superfluas reklami pri la amika kaj gaja etoso reganta inter ni : Angloj, Belgoj, Francoj, eĉ Japanoj forgesas la lingvajn barojn kaj ĉion, kio oficiale apartigas ilin : nacieco, religio, filozofiaj konceptoj, por formi nur unu rondon familian.
La Nordfranca Esperanto-Federacio elkore invitas siajn membrojn ĉeesti la 14-an amikan renkontiĝon, kies programon ni prezentas al vi ĉi-sube:

**Vendrede 28-an de aprilo:**

19.00 Vespermanĝo
Interkonatiĝa vespero neformala

**Sabate 29-an de aprilo:**

8.30 Matenmanĝo
9.30 – 10.30 – Malfermo; la kasisto deĵoros enspezi.
Ĉirkaŭpromenado en la urbo, laŭvole.
12.30 Lunĉo (bufedo)
Posttagmeze – Ekskurso al Canterbury (80p)
18.30 Vespermanĝo
20.00 (?) Oficiala akcepto de la urbestraro de Folkestone; dancado kaj bufedo.


**Dimanĉe 30-an de aprilo**

9.00 Matenmanĝo
Diservo (verŝajne ekumena – horo fiksota)
12.30 Lunĉo
Posttagmeze – Grupaj diskutoj pri aktualaj temoj; mallongaj raportoj de ĉiuj grupoj.
19.00 Vespermanĝo
20.00 Koncerto

**Lunde 1-an de majo**

Estas feria tago; diversaj amuzaĵoj okazos en la urbo, kiujn oni povos viziti. Ni intencas, ke lundo estu libera tago por viziti la urbon, lokajn belajn parkojn kaj amuzaĵojn, aŭ babiladi kun konatoj.

12.30 Lunĉo
19.00 Vespermanĝo, por tiuj, kiuj restos.



*Anglikana preĝejo Folkestone*

**KOSTO** Po persono por ĉiu tago 8 pundoj (ĉambro, matenmanĝo, lunĉeto kaj vespermanĝo)
Kotizo – 3 pundoj
NB. Unu angla pundo valoras ĉirkaŭ 8,50 FF.

Bonvolu sendi antaŭpagon je 5 pundoj kun la mendilo kaj, por pliaj informoj, turnu vin al la Franca Reprezentanto :
Jacques DOYELLE, 9 rue de Dunkerque,
F 59630 BOURBOURG
Poŝta konto: Congrès Espérantiste du Détroit
C.C.P. LILLE No 4356-09.

**LA VETURADO**

La ŝipo (aŭ la glitŝipo) ne samkostas, kiam temas pri du aŭ tri-taga vojaĝo. Jen tarifo:

Du-taga: 83 F po persono
42 F po infano malpli ol 14-jara
Tritaga: 116 F po persono
58 F po infano malpli ol 14-jara

Temas pri la glitŝipo kiu iras nur al DOVRO. Se vi kutimas atingi la havenon trajne, informiĝu pri eventuala kongres-bileto al FOLKESTONE (de via loko) kaj pri la horaro, kiu plej taŭgas.

**Informas:**
**Bulonjo** : por la ŝipo: tel.: (21) 30 25 11
glitŝipo: tel.: (21) 31 71 22
**Kalezo** : por la ŝipo: tel.: (21) 34 70 70
glitŝipo: tel.: (21) 34 65 70
**Dunkerko:** nur ŝipo : tel.: (20) 66 80 01

**Nun mi atendas vin. Ĉiam je via dispono jene: persona telefono : (20) 68 18 30**

Jacques DOYELLE

# DIVERSAĴOJ

*Kafejo ESPERANTO en Vroclavo:* La Direkcio de la vojevodia Konsum-Kooperativo SPOLEM decidis doni la nomon 'Esperanto' al novkonstruita kafejo, proksime de la ĉefa Stacidomo. La menuo kun Esperanta informilo estas presita dulingve, kaj post Esperanto-kurso la kelnerinoj priservados gastojn en la internacia lingvo. En la kafejo troviĝas anguleto kun esperantaj gazetoj.

*Moderpreza gastejo :* Gastejo 'Edmond Privat' je 1.100 metroj de alteco borde de la urbo La Chaux-de-Fonds (Svislando), metas je dispono de la Esperantistoj moderprezan kaj mezkomfortan restadejon. En ĝia tuja proksimeco troviĝas vastaj arbaroj kaj paŝtejoj, facile atingeblaj montsuproj, multaj promenvojoj, skilifto kun lumigita deklivo laŭirebla eĉ dumnokte. La vivo en la gastejo baziĝas sur la principo de mem-instruado. Adreso: Kultura Centro Esperantista, Postiera 27, CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando.

*Eŭropa Centro:* Laŭ impulso de UEA estas restrukturita 'Eŭropa Esperanto-Centro', kun sidejo en Bruselo. Ĝi estos sekretariato de la 'Eŭropa Esperanto-Unio'.

*Esperanto-Kabareto* funkcias ĉiumonate en Parizo (gvidata de TESPA).

*Internacia adres-libro:* La Esperanto-Centro en Paderborn (FRG) lanĉis la ideon eldoni adreslibron de Esperantistoj, en kiu ankaŭ estu frazaro, kiel en vojaĝa gvidilo, kaj E-rapidkurso por vojaĝemuloj.

Tiuj, kiuj resendos slipon kun bezonataj indikoj ricevos senpage kopion de la aperonta adreslibro.

Skribu al: Esperanto-Centro, Grunigerstr. 5, D-4790 PADERBORN (FRG).

*Por niaj kluboj:* La 10-an de decembro 1978 estos la 30-a datreveno de la 'Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj'.

Estus utile, ke la E-kluboj kaj organizaĵoj mendu jam nun kvanton da ekzempleroj de la Esperanta traduko de tiu Deklaracio. La mendojn oni adresu al la diverslandaj UNESKO-reprezentejoj, aŭ al: UN, UN Plaza, NEW YORK, N.Y., Usono.

*El Ĉinio* 'Amitién Franco-Chinoises' reklamas dum ekspozicio pri ĉinaj periodaĵoj en Esperanto kaj en 15 aliaj lingvoj.

*Oficiala akcepto:* Okaze de la 90-jara datreveno de E°, la pola ambasado en Bruselo akceptis fine de 1977 ĉ. 120 esperantistojn el 6 nacioj (i.a. 4 francojn). Festparolis Prof. P. JANTON, aŭtoro de la poŝlibro 'L'espéranto' (kolekto 'Que sais-je?'), kies 2-a eldono ĵus aperis.

*Dum jarcentoj:* En la libro 'Pri internacia lingvo dum jarcentoj', 2-a eldono, de I. DRATWER, p. 207-a, aperis resumita traduko de letero de V. GISCARD d'ESTAING, sendita la 27-an de aprilo 1874 al Nordfranca esperantisto.

*Diservoj:* En la ĉefurbo de Luksemburgio, pastro KINDLER celebras ĉiudimanĉe esperantlingvan diservon.

*La usona prezidento:* Dum sia restado en Varsovio, Prezidento J. CARTER spertis malfacilaĵojn pro nekapabla interpretisto. Raportis la tutmonda gazetaro, kun multaj ekzemploj de mistradukoj.

*La jaro 1978* En marto *Heroldo de Esperanto* publikigis ilustritan numeron kaj kalendaron pri la ĉefaj Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj de la jaro 1978.

*Pedagogia renkontiĝo en Svedio:* Internacia renkontiĝo de Freinet-Edukistoj (RIDEF) havos lokon en Arjang (Svedio), de la 23-a de junio ĝis la 5-a de aŭgusto. Inf: J. MARIN, 9 rue A. Lejeune, F 93170 GAGNOLET.

## LA RADIO

*Soveta...* La 4-an kaj 5-an de februaro, en la kadro de la vesperaj itallingvaj programoj, la Moskva Radio provelsendis en E°. Adreso: Radio Moskvo, itala fako, S-ro V.K. ŜVECOV, Pjatnickaja 25, SU-113 035 MOSKVO. Skribu por peti esperantlingvajn elsendojn!

*Pola...* Pola Radio, dum intervjuo kun Prof. NEERGAARD (Dano) disaŭdigis en siaj E-lingvaj programoj informojn pri la prelegserioj de 'Somera Esperanto-universitato' kaj 'Someraj Universitataj Kursoj'. Mencinde, ke du sekretarioj de S.U.K. 1978 (en Lieĝo) estas membroj de Nordfranca Esperanto-Federacio.

*...kaj Portugala Radio* La Portugala Radio elsendas ĉiudimanĉe en Esperanto je la 18,20, 20,50 kaj 21,50 horo.

# SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

## ASTRONOMIO – PSIKOLOGIO INTERNACIA LITERATURO

*Datoj :* 06-27 de aŭgusto 1978
Ĉiu kalendara semajno estas en si mem kompleta unuo.

*Loko:* Universitato de LIEGE (Belgio) centro Dumont.

*Partoprenkondiĉoj:*
Abiturienteco aŭ samnivela klereco.

*Studprogramo:* Ĉiu unusemajna kurso ampleksas 12 lekciojn de po 45 minutoj, kiuj okazas ĉefe matene de lunde ĝis vendrede. Sabato estas dediĉita al ekzamenoj, ekskursoj, ktp.

ASTRONOMIO lekcios D-ro M. Maitzen (Aŭstrio)
- 1-a semajno: Stela magnetismo
- 2-a semajno: La strukturo kaj dinamiko de nia galaksio
- 3-a semajno: Modernaj observoteknikoj en la astronomio.

PSIKOLOGIO lekcios
- 1-a sem.: C. Piron (Svislando) Strukturiĝo de la personeco
- 2-a sem.: M. Landmark (Norvegio) Infanpsikologio: enkonduko en la socialajn, emocian kaj intelektan evoluon.
- 3-a sem.: J. Lieberman (Usono): seksedukado kaj psikoterapio: integriĝo je mensa sanigo.

INTERNACIA LITERATURO
- 1-a sem.: V. Benczik (Hungario) Verkado kaj legado de beletro en fremda lingvo.
- 2-a sem.: G. Silfer (italo loĝanta en Finnlando) Enkonduko al literatura kritiko.
- 3-a sem.: G. Silfer: Sciencfikcio: internacia ĝenro por internacia lingvo.

Kromprogramo: ekskursoj, filmvesperoj, sportado, kulturaj aranĝoj; perfektiga Esperanto-kurso, gvidata de Jean-Paul Vilhelm (Francio).

*KOTIZOJ* : la restadkostoj aldoniĝas al la programkostoj.

| | | |
|---|---|---|
| programkostoj | (semajne) | 900,-bf |
| | | 650,-bf por studentoj |
| PEK | (semajne) | 400,-bf |
| restadkostoj | (semajne) | 2000,-bf |
| (eventuale modifendaj post decido de la universitato) | | |
| taga aliĝo | | 200,-bf |

*STIPENDIOJ:* estas disponeblaj kelkaj stipendioj (Norwich Jubilee Foundation por junaj Britoj; stipendio Hodler; ekz.). Interesuloj sin turnu al la estraro de SUK.

POR PLIAJ INFORMOJ SKRIBU AL
SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ
BP 9, B-4000 LIEGE X.


*ESPERANTO-DOKUMENTOJ*

*DOCUMENTS SUR L'ESPERANTO*

*La unuaj dokumentoj en la nova franclingva serio nomiĝas*

Espéranto et écoles européennes

*kaj*

L'Espéranto et l'Association Universelle d'Espéranto

*La plej freŝaj dokumentoj en la Esperanta serio titoliĝas*

Esperanto kaj la pliaĝuloj *(I. Gál)*

*kaj*

Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo? *(Piron)*

*Abono por 10 sinsekvaj dokumentoj en unu el la serioj kostas 27,50 gld. La abonojn akceptas ĉiuj kotizperantoj de UEA kaj ankaŭ la Centra Oficejo de UEA.*

## KULTURAJ ARANGOJ 1978

### ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo Grésillon, 49150 Baugé

*PASKO*

Alveno sabaton 8an de aprilo
Foriro sabaton 15an de aprilo posttagmeze
– Renkonto de infanoj
(akompanataj de plenkreskuloj)
– Kiel gvidi kurson?
praktika pedagogio por kursgvidantoj

*SOMERO*

UNUA PERIODO (3 - 22 de julio)
Alveno lundon 3an de julio
Foriro sabaton 22an de julio
–Diverstemaj prelegoj – Diskutoj
–Distraj aktivaĵoj
–Ekskursoj
–Praktikado de la lingvo (kursoj)
Lundon 3an de julio interkona vespero

DUA PERIODO (23an de julio – 12an de aŭg.)
Alveno dimanĉon 23an de julio
Foriro 18an de aŭgusto
–Kurso por komencantoj
–Praktikado
–Supera kurso
–Manaktivaĵoj
–Ekskursoj
Dimanĉon 23an de julio: interkona vespero

TRIA PERIODO (13an de aŭg. –2an de sept.)
Alveno dimanĉon 13an de aŭgusto
Foriro sabaton 2an de septembro
Programo : vidu 'dua periodo'.
Dimanĉon 13an de aŭgusto : interkona vespero

N.B. : Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj, sed la celo de la kursoj ne estas la preparado de tiuj ekzamenoj.

## *LA PROVERBOJ RESUMAS LA SAĜON DE L'POPOLO*

### PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA

(kompilis : Lucien BOURGOIS)

(7)

Ce que femme veut, Dieu le veut.
Kion virino volas, Dio volas.

Ce qui est fait est fait.
Farita ne refariĝos.[z]
– Kio fariĝis, jam ne refariĝos.[z]
– Kontraŭ faro farita ne helpas medito.[z]

C'est au fruit que l'on reconnait (qu'on connait) l'arbre. *(Mateo)*
– On reconnait l'arbre à son fruit.
– Laŭ la frukto oni arbon ekkonas.[z]

C'est au pied du mur qu'on voit le maçon.
Ĉe l'brikoj kaj mortero montriĝas la majstro.

C'est dans le besoin que l'on reconnait ses vrais amis.
Amikon montras malfeliĉo.

C'est en forgeant qu'on devient forgeron.
Forĝadante oni iĝas forĝisto.
– Ripetado estas plej bona lernado.[z]

C'est la dernière goutte qui fait déborder le vase.
Unu guto plenigas la glason.[z]
– Unu sola guto la glason plenigas.[z]

C'est la plus mauvaise roue du chariot qui fait le plus de bruit.
Rado malbona knaras plej multe.[z]

Chacun doit répondre de ses fautes.
De kiu la kulpo, por tiu la puno.[z]
– Kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu.[z]

Chacun fait son lit comme il veut se coucher.
Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto.[z]

*ĈU VI PAGIS VIAN JARAN KOTIZON?*
*Nee, nepre faru!*
*Dankon pro via subteno!*

*La Gérant resp. Lucien BOURGOIS, 25 rue Gambetta, 62950 NOYELLES-GODAULT*
*Presis en Anglujo FELLOWSHIP PRESS, Gloucester.*